

La Esperanto-Gironde Informilo



JUNIO 2026

N° 184

Freŝe eldonita!



La valizeto 518 de Marcelo Redulez

ESPERANTO-GIRONDE
ASSEMBLEE GENERALE
Maison de quartier Toctoucau à PESSAC
le 26 avril 2026 à 10h 30

Présents ou représentés : Jean-Sébastien Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty (pouvoir à Yannick Dumoulin), Gloria Gargallo (pouvoir à Claudine Pomiro), Hervé Giranton, Katya Gradzion, Lucienne Laroche (pouvoir à Janine Dumoulin), Olivier Moreno, Seán Ó Riain, Claudine Pomiro, Marcel Redoulez, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie (pouvoir à Bernard Sarlandie), Eric Tiffon.

Excusés : Joël Lajus, Jean-François Seylier.

1. Rapport d'activité

Année 2025 :

- LEGI : sont parus 5 numéros : 177 à 181.
- Réunions : Il y a eu 10 réunions :
 - 11 janvier à la Maison de quartier Pessac Cap de Bos
 - 16 février à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 23 mars à la Maison de quartier Pessac Bourg (AG)
 - 13 avril chez Jean-Seb et Annie à Pessac
 - 11 mai à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 15 juin à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 28 septembre à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 26 octobre à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 23 novembre à la Maison de quartier Pessac Bourg
 - 14 décembre : Zamenhof-Tago à la Maison de quartier Pessac Bourg
- Activités et événements :
 - Poursuite des cours d'espéranto à l'université.
 - Présentation, en janvier, au cinéma de Bègles de la version en espéranto de *Ne timigas nin ruinoj*
 - La version officielle du livre de chansons de Brassens a été imprimée.
 - Participation de plusieurs membres d'Espéranto-Gironde à l'événement « La poésie des langues, héritage en mouvement ».



- Participation de Marcelo, Claudine et Katya au Congrès Espagnol d'Espéranto à Soria : présentation de la version en espéranto de *Ne timigas nin ruinoj* et de la conférence sur Aristides de Sousa Mendes.
- Participation au défilé du 1er mai de plusieurs membres d'Espéranto-Gironde avec la banderole Espéranto.
- Participation de Marcelo, Claudine, Katya, Jean-Seb et Annie à la rencontre à Saint-Palais avec des espérantistes basques.
- Plusieurs membres ont participé au forum des associations à Pessac en septembre.
- Traduction d'une BD espagnole par un groupe de traduction formé, entre autres, de membres d'Espéranto-Gironde.
- Bernard et Rose ont participé à la journée de l'UNOE à Montalivet.
- Dissolution de l'association GEME : l'association lègue son matériel (livres, matériel pédagogique, objets divers) à Espéranto-Gironde et virement du reliquat du compte bancaire à celui d'Espéranto-Gironde
- Le musée Brassens de Sète a fait l'acquisition de 15 exemplaires du livre.
- Seán a participé au congrès de Brno et a été élu premier vice-président d'UEA ; un article à son sujet a été publié dans Espéranto (revuo).
- Marcel, Seán et Elvezio ont participé au congrès virtuel d'UEA en décembre.
- Rendez-vous mensuels, le 4ème jeudi du mois, au café associatif Le Petit grain.

Rapport d'activité approuvé à l'unanimité

2. Rapport financier

En 2025, 27 membres étaient à jour de leur cotisation.

Recettes : 1441,43 €

Des dons de 10 € x 2 ont été faits à l'occasion du règlement des cotisations.

Dépenses : 860,82 €

Solde positif sur l'année 2025 : 580,61 €

Remarques : Le solde positif est dû aux ventes de livres : 51 ont été vendus en 2025 = 837,00 €.

Depuis début 2026, 5 livres ont été vendus

Il reste 9 livres à vendre pour couvrir la totalité des frais engagés (droits, impression).

L'état des finances permet d'acheter les 20 exemplaires du livre de Marcelo (voir annexe)



Rapport financier approuvé à l'unanimité

3. Projets

- Participation au concours international de littérature Hristo Garo-Hrima : *Mia plej bela esperanta rememoro*

- Publication du roman *La Vazileto 518* de Marcelo

- Présentation, au Congrès Universel de Gratz, du spectacle *Sorçe de verda stelo* par la troupe éphémère AER, avec Marcelo et Kajto, ainsi que des artistes sud-coréennes.

Amira, l'une des artistes sud-coréennes, est cheffe de chœur à Séoul. Ses moyens ne lui permettent pas d'assumer le coût du voyage jusqu'à Graz. Une aide de 2000 € pour l'ensemble du groupe a été demandée à UEA. Il semble qu'elle soit accordée. Mais la demande d'hébergement gratuit pour Amira n'a pour l'instant pas reçu de réponse.

Du fait du cinquantenaire de l'acceptation de KEA (association coréenne d'espéranto) au sein d'UEA, on pourrait envisager de demander une subvention à KEA.

Pour l'instant on ne sait pas si Amira pourra venir, donc si le spectacle pourra avoir lieu.

- Zamenhof-tago 2026 : L'idée d'inviter JoMo est approuvée à l'unanimité.

Marcelo prendra contact avec lui et Elvezio s'occupe de trouver une salle.

- Participation active d'Espéranto-Gironde au programme Esperanto 140. Bernard a proposé que soit présenté au conseil municipal du Haillan de nommer une salle municipale du nom de Zamenhof. Ce pourrait être l'occasion d'un événement en décembre 2027.

- Participation au forum des associations de Pessac en septembre.

- Rendez-vous mensuels au café associatif Le Petit Grain tous les 4èmes mercredis du mois.

4. Questions diverses

- Les frais d'envoi ont augmenté de 6 centimes pour LEGI.

- Eric a constaté que le compte Facebook d'Espéranto-Gironde avait disparu : il en a créé un nouveau.

- L'Autriche a reconnu l'espéranto comme part de son héritage culturel national.

- Jorgos propose d'acheter 20 exemplaires du livre Brassens aux conditions des libraires (rabais de 30%) + 3 livres gratuits.

Opposition de l'assemblée : on ne peut pas vendre le livre à perte.

Si le livre est vendu avec un rabais de 30%, cela correspond au prix coûtant. Cela sera possible quand les 9 livres à prix normal (18 €) auront été vendus.

5. Tiers sortant

L'ensemble des membres du conseil d'administration démissionnent et se présentent à nouveau.

Katya Gradzion est candidate.

ESPERANTO-GIRONDE

Réunion du conseil d'administration pour l'élection du bureau le 26 avril 2026 à 12h 40

Présents : Jean-Sebastien Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Katya Gradzion, Seán Ó Riain, Eric Tiffon

Sont élus :

Président : Elvezio Canonica

Vice-Président : Seán Ó Riain

Trésorier : Yannick Dumoulin

Trésorière adjointe : Katya Gradzion

Secrétaire : Janine Dumoulin

Secrétaire adjoint : Luca Buselli

La réunion se termine à 12h 50.



Pri la konkurso *Mia plej bela esperanta rememoro*

Post la manĝo, ĉiuj laborgrupoj plu laboris pri siaj tekstoj.

Vizitis nin Iberla kaj Thibaud.



Raportis Janine

ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC

la 24an de majo 2026

de la 10a 30 ĝis la 16a



Ceestas: Jean-Seb Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Joël Lajus, Seán Ó Riain, Klodin' Pomiroł, Marcelo Redoulez, Eric Tiffon

Senkulpigataj: Gloria Gargallo, Lucienne Laroche, Olivier Moreno, Bernardo kaj Rose Sarlandie

Elvezio salutas ĉiujn kaj donas novaĵojn de Klemento: nun li laboras kaj poste vojaĝos al Barato kaj aliaj landoj.

Pri la koncerto de JoMo: Elvezio kontaktis la salonon Salle de France kaj la salonon Salle de l'Orangerie, kiun oni povas havi senpage. Sed tiu ĉi estas granda salono, ne spektaklejo. La koncerto povus okazi la 6an aŭ la 13an de decembro.



Propono de donaco de libroj, kiun ni ricevis: Elvezio povos telefone kontakti la donaconton.

Kongreso pri lingvistiko, kiu temas pri Esperanto okaze de la 140a datreveno. La SHESL (Société d'histoire et d'épistémologie des sciences du langage) organizos internacian kongreson en Parizo (9-11 de junio 2027): [https://cak.ehess.fr/system/files/2026-06/SHESL Espéranto 2027 CFP PDF avec image.pdf](https://cak.ehess.fr/system/files/2026-06/SHESL_Espéranto_2027_CFP_PDF_avec_image.pdf)

Tiu asocio kunigas lingvistojn el pluraj universitatoj el la tuta mondo, kiuj decidis dediĉi sian jaran kongreson al tiu studobjekto. Diversaj temoj estas proponitaj. Oni povas sendi proponojn (ĉirkaŭ 2000-3000 signoj) ĝis la 30a de septembro 2026 al: shesl-esperanto-2027@listes.u-paris.fr

Seán estos en Tours la 1an de junio por prelegi en la angla pri UEA.

Marcelo: La monhelpo de Espéranto-Gironde ebligis al Amira akiri aviadilbileton. Do la projekto por Graz realiĝos. Oni ĝis nun ne scias la daton de la spektaklo. Dum la kongreso Marcelo ankaŭ prezentos la libron *La valizeto 518*. Nia korea amiko Ermito prelegos pri la psikologia valoro de la Zamenhofa proverbaro.

En Haux, unu fojon monate, sabate, okazas libro-kunveno, en kiu la partoprenantoj prezentas libron laŭ antaŭelektita temo. La temo de la pasinta kunveno estis historiaj libroj. **Marcelo** parolis pri *L'Été du grand bonheur* de Georges Coulonges (2000), kiu temas pri somero 1936 en Ĝirondio (en tiu romano aperas mencio pri Esperanto).

Pri la renkontoj en la biblioteko de Haux, vd raporton en p. 20.

Georges Coulonges estis la verkisto de la kanzono *La Commune* (kantita de Jean Ferrat). Tiu kanzono enkondukis la spektaklon *La komuno kantante* de La Kompanoj en 1997. Marcelo renkontis Georges Coulonges la sekvan jaron, ili kune parolis pri Esperanto. Eble la mencio pri Esperanto en la romano devenas de tiu konversacio!

Marcelo: Eldonota libro ĉe SAT: *La Silento de la armiloj* (*Le Silence des armes*, Bernard Clavel)

Marcelo, Klodin', Katja partoprenis en la eŭska renkontiĝo en Saint-Palais.

Dum la restado, ili vidis parton de la «Okcitanan kuradon» (de Bedous al Anglet): ĉiu grupo kuras unu kilometron, kun bastono kaj rubando, kiun ĉiu grupo transdonas al la sekva grupo je la fino de la kilometro. La kurado neniam haltas, ĝi okazas dum tago kaj nokto. Ĝi daŭras 10 tagojn por 2000 km. Ĝi subtenas la okcitanan lingvon kaj ties instruadon. Unue tiu kurado estis organizita pour subteni la eŭskan lingvon. Vd. la poezian raporton de Katja pri la eŭska renkontiĝo en p.10.

Elvezio: Por la koncerto de JoMo estus bone kontakti la okcitanan asocion.

Joël raportas pri artikolo aperinta en gazeto *L'Âge de faire*, en la tempo de la SAT-Amikara kongreso en Artigues. Cetere Joël retrovis banderolon, kiun ni instalis por la kongreso «L'espéranto avec les autres mouvements alternatifs». Ĝi estas iomete defektita, sed povas ankoraŭ esti utila. Li donacas la kongreslibreton de la kongreso de 2007 al Elvezio kaj Seán.



Elvezio: La forumo de la asocioj okazos sabaton, la 5an de septembro. Estos prezento de Esperanto, kantado (10-minuta parolrajto).

Posttagmeze ni unue zorgas pri la konkurso. Ĉiuj tri eseoj estas preskaŭ pretaj.

Poste Marcelo parolas pri sia romano *La valizeto 518*, kiun li prezentas pere de luda bildaro. Vd la prezenton de la romano en p. 22.

Li vendas 23 ekzemplerojn al Esperanto-Gironde po 6,30 €.

La publika vendoprezento estas 9 €.

Elvezio, Seán, Jean-Seb, Hervé, Luca, Joël, Yannick, Eric aĉetas unu; Eric aĉetas du pliajn, vendotajn ĉe Le bon coin.

La venonta kunveno okazos la **28an de junio en Pessac Bourg**.



Raportis Janine



SOLVO DE LA ENIGMO PRI LA PLANTANOMOJ EN LA GRANDA BALO SUR KAMPO PUBLIKIGITA EN LEGI NUMERO 182

Planto-nomoj laŭ ordo de la apero en la novelo:

lekanto - papavero - lavendo - sonko - brizo** - damaska nigelo.

***** Ĉu vi enlistigis brizon inter la plantoj? Laŭ PIV brizo havas du signifojn:***

① *briz/o* ☞ *Regule okazanta vento, vertikale ascenda k kaŭzata de la varmiĝo de la malsupra tersurfaco (indico 4–6 de la Boforta skalo): marborda brizo blovas de maro al tero tage k de tero al maro nokte; glaĉera brizo.*

② *briz/o* ☞ *G. (Briza el poacoj) de unu- kaj plur-jaraj herboj kun larĝaj, pendaj spiketoj en maldensa paniklo; ĉ. 20 sp-oj el Eŭropo, Azio k S Ameriko.*



RAPORTO PRI LA PRINTEMPA EŬSKA RENKONTIĜO 2026

Pasintjara spuro ankoraŭ ne paliĝis,
En montoj eŭskaj ĝi milde hejmiĝis.
Sed jaro pasis — kaj ree ni venis,
Kaj novan paĝon kune komencis.

Ne dek ok ĉi-foje — malpli, sed ne malpli varme,
Dek unu koroj — sed ritmo samsame.
Ne nombro gravas en tia etoso —
Sed fajro interna kaj komuna voĉo.

Jam la unua vespero — sen longa atendo,
Ni iris spekti moviĝantan eventon:
Passem tra urboj, tra nokta vojeto —
Lingvo en paŝoj, en viva sekreto.

Vortoj ne nur diritaj — sed portataj,
De man' al man' — kiel fajro transdonataj.
Kaj ni staris flanke, sed ankaŭ interne —
Ĉar lingvoj vivas en homoj sincere.

Ĉi-jare programo — pli klare skribita,
Sed mistero restis — ne tute malkaŝita.
Ĉar plej gravaj momentoj ne estas en plano —
Sed en tiu “nun”, kiu fluas spontane.

Matene ni iris al muelejo malnova,
Kie akvo kaj radoj kunlaboras denove.
La spiro de vento, la sono de fluo —
Rakonto pri vivo, labor' kaj faruno.

La gvidanto parolis en lingvo eŭska,
Kiel kanto antikva, profunda kaj homa.
Kaj Naĉo, fidela — inter ni kaj la mondo,
Tradukis kun sento ĉiun vorton kaj ondon.

Ni vidis la radojn, la forton de akvo,
Kaj kiel el greno fariĝas nutraĵo.
Li klarigis pacience, kun gesto kaj rido,
Kiel funkcias la muelejo en sia ritmo.

Kaj tuj apude — sub ĉielo iom nuba,
Ni faris piknikon, etoso tre luma.
Manĝaĵoj, ridetoj, konversacio flua —
Kaj tempo forglitis, ni jam survoje.



Sed kiam ni preskaŭ revenis al hejmo,
La pluvo nin kaptis — printempa dilemo.
Sed kia feliĉo — ke proksime la domo,
Kaj ridoj eĥis pli varme el koroj.

Ni iom ripozis — kaj poste, kun paŝo,
Ni iris al muzeo kun nova kuraĝo.
En muroj de monaĥejo, silenta kaj dika,
Historio spiris en formo antikva.

Ni aŭdis pri moneroj de tempoj forpasintaj,
Pri vivo en Navaro — rakontoj profundaj.
Sur muroj — portreto kun nobla vizaĝo-
La patrino de reĝo Henriko la kvara.

Kaj ankaŭ arbo — genealogia vojo,
De Navaro ĝis la dinastio de la Burbonoj.
Historio kvazaŭ rivero fluanta tra jaroj,
Kun branĉoj, eventoj kaj homaj deklaroj.

Sed estis ankaŭ mapo — simpla, sed grava,
Kiu montris regionojn de l' lingvo eŭska:
Kie ĉiu valo, ĉiu montara parto
Parolas iom alie — kun propra arto.

Kaj jen — nova salono subite malfermiĝis:
Teatro nin atendis — kvazaŭ mondo vekigis.
Sceno jam preta, kun lumo kaj spaco —
Kaj sento: la tago ne finiĝas sen graco.

Kaj poste la ĉambro - la muro kolora
Plenplena je blazonoj, simboloj valoraj.
Baskaj reprezentoj — ĉiu kun historio,
Ĉiu kun memoro, kun propra signifo.

Luj kun leonoj, aliaj kun turoj,
Kun arboj, kun ondoj, kun fortikaj muroj.
Laŭ regiono — ĉio ŝanĝiĝas subtile,
Sed kune ĝi formas identecon trankvile.

Kaj ni promenadis inter tiuj bildoj,
Kvazaŭ tra jarcentoj, tra rakontaj filoj.
Ĉiu blazono — kiel vorto en frazo,
Kiu rakontas pri l' popolo sen bruo kaj brilo.



Kaj poste — historia salono malfermiĝis,
Kaj tempo subite malantaŭen turniĝis.
De prahistoriaj spuroj ĝis hodiaŭa mondo —
Ni sekvis la vojon tra jarcenta ondo.

Ŝtonoj, iloj, signoj de vivo komenca,
Rakontis pri homo — silenta, sed pensa.
Paŝo post paŝo — evoluo montriĝis,
Kiel la mondo iom post iom konstruiĝis.

Kaj ne nur historio en fora distanco —
Sed ankaŭ ĉiutago, en simpla nuanco:
Pri vivo de homoj, ilia laboro,
Kutimoj, tradicioj — kun hejma valoro.

Gvidanto kun sperto, kun voĉo sincera,
Montris la vivon — ne nur teoria.
Kiel oni loĝis, laboris kaj vivis,
Kaj kiel la tempo ilin formis kaj gvidis.

Kaj tiel ni staris — inter “iam” kaj “nun”,
Sentante la tempon kiel ion komunan.
Ĉar ĉio, kion ni vidas — ne estas hazarda,
Sed parto de vojo — profunda kaj granda.

Kaj denove Naĉo — kun pacienca atento,
Tradukis por ni ĉiun gravan momenton.
Ĉiu traduko — ne nur simpla klarigo,
Sed kvazaŭ dua vivo por ĉiu historio.

Kaj fine — kun rideto, surprizo vigliĝis:
Pri baska pilota rakonto ekestis.
Ludo rapida, kun ritmo kaj forto —
Parto de kulturo, ne nur simpla sporto.

Kaj eĉ ĉampiono — el tiu ĉi loko,
Fiero de regiono, viva en ĉiu voko.
La spirito eŭska — en ludo kaj vivo,
En movo, en tradicio — kun forta motivo.

Post la muzeo — nova prezento komenciĝis,
Pri Finistero — kie la mondo preskaŭ finiĝis.
Ĉe limo kun Hispanio, inter vento kaj maro,
Kie horizonto ŝajnas senfina kaj klara.



Rakonto pri delfeno — soleca, sed fama,
Kun naturo libera kaj konduto tre drama.
Oni avertis: “Ne tuŝu, restu malproksime!” —
Sed homoj, nu... ofte agas ne tre estime.

Ĉar malgraŭ la reguloj kaj zorga peto,
Ili proksimiĝis — kun tro da intereso.
Kaj la delfeno mem — ne tute kontraŭis,
Eĉ ŝajnis ke li atenton ĝui konstruis.

Li naĝis ĉirkaŭe, kvazaŭ en spektaklo,
Kun homoj kiel publiko en viva miraklo.
Stranga amikeco inter homo kaj maro —
Kun limo maldika inter zorgo kaj varo.

Kaj mi mem provis — kun fotilo en mano,
Eniri la akvon... sed ho, kia plano!
La maro estis malvarma — vere glacia,
Ne tuj mi kuraĝis — estis provo heroeca!

Unu paŝo, du paŝoj — kaj reen preskaŭ,
Sed por la video — mi min venkis!
Ĉar momentoj tiaj ne venas dufoje,
Eĉ se la akvo vin testas per frostoj survoje.

Tion ĉi prezentis Marcelo kun zorgo kaj sento —
kaj ankaŭ pri insulo Ruzik - kun naturo sincera.
Tie loĝas birdoj, en granda komunumo,
Inter ili — norda sulo — kun blanka plumaro kaj flugo.

Dudek mil paroj — impona nombro,
Sidantaj kune sub ĉiela ombro.
Sur rokoj severaj, super ondoj bruaj,
Ili konstruas nestojn — simplaj, sed fortaj.

Kaj plej fascina — ilia amhistorio:
Elekti partneron — por la tuta vivo.
Danco, donaco, rigardoj subtilaj —
Rilato komenciĝas per gestoj mirindaj.

Kaj jen interesa fakto — ne sen signifo:
Ili demetas nur unu ovon en ĉiu jar-ciklo.
Kaj kiam ideto al mondo aperas,
La gepatroj ĝin nutras ĝis forte ĝi kreskas.



Kaj fine de ĉio — sub vespera aero,
Eksonis kanto kun viva espero.
Sulinsulo leviĝis tra spaco kaj vento,
Kaj kunigis nin ĉiujn en sama momento.

Ni ree babilis — kiel iam, sen limo,
Inter lingvoj, kulturoj — unu komuna ritmo.
Kaj nokto denove nin milde envolvis,
Kiel pasintjare — nenio dissolviĝis.

Kaj dimanĉon — denove, en trankvila mateno,
Rafa per videovoko, kun entuziasma tono,
Rakontis al ni pri grava historia persono,
El Donapaleu — en Navaro regiono.

Pri Kastilio, konfliktoj kaj kredo,
Inter protestantoj kaj katolika heredo.
Pri Navaro — kun sia propra destino,
Kaj vojo de homo tra sorto kaj fino.

Kaj inter rakontoj — eŭskaj frazoj sonis,
Kiel etaj perloj, kiuj memoron kronis.
Kaj ni aŭskultis — kun penso kaj koro,
Kiel ĉiu vorto malfermas novan pardonon.

Li ankaŭ menciis libron interesan,
Kun pensoj profundaj kaj lingvo impresa.
Vere bela rakonto — ne nur informo,
Sed viva vojaĝo en historia formo.

Ni ankaŭ promenis tra la urbeto,
Kun ludo intelekta, ĝojo kaj profunda sento.
Stratetoj kvazaŭ nin mem rakontis,
Kaj ĉiu paŝo novan memoron donis.

Ni ankoraŭ vidis akvofalon karan,
Kie ni jam estis — memor' ankoraŭ klara.
Loko konata, sed ĉiam nova sento,
Kvazaŭ tempo rondiras en milda momento.

Kaj tie ni aŭdis rakonton kuriozan,
Pri loka specialaĵo, iom misterozan:
Kolombo kun kapuĉilo — stranga, sed bela,
Tradicio viva, iomete fabela.



Tiu programo — kun zorgo kaj amo,
Estis preparita de Mari, tre gastama.
Ŝi varme nin akceptis, kun koro malferma,
Kaj ĉiu momento fariĝis pli bela.

Kaj Marcel, fidela dum ĉiu paŝado,
Estis nia gvidanto en la promenado.
Kun voĉo trankvila kaj scioj profundaj,
Li montris al ni lokojn vere abundajn.

Sankta Paleo estas vere gastama,
Kun etoso varma, sincera kaj ama.
Do venu — vi vidos, mem esploros,
Kaj eble ankaŭ vi ĉi tie enamiĝos.

Kaj por tiuj, kiuj ne estis antaŭe —
Jen rakonto pri homoj, simpla kaj prava:
Pri vojaĝo ne nur tra montoj aŭ landoj,
Sed tra koroj — kun malfermitaj manoj.

Kaj por tiuj, kiuj memoras la paseon —
Jen daŭrigo, ne fino de nia rakonto.
Ĉar ĉiu renkontiĝo estas kiel semo —
Kreskanta silente en komuna memoro.

Do ĝis revido — eble jam baldaŭ,
En alia printempo, sub simila ĉielblu'.
Ĉar tia renkonto ne restas nur tie —
Ĝi vivas en ni... kaj revenas ĉiam plie



Verkis Katja

La 1an de majo tra Bordoza

La banderolo de ESPERANTO-GIRONDE



Bernardo kaj Dominiko (ankaŭ Bruno) partoprenis la manifestacion tra la stratoj de Bordoza. Kiel videblas sur la foto, ili dungis infanojn por helpi porti la banderolon. Ĉi-lastaj ne estis kontentaj, ĉar ne ricevis salajron kompense.

Tiokaze Dominiko sukcesis disdoni inter 300 kaj 400 flugfoliojn pri la somera kurso de Esperanto, kiu komenciĝos komence de junio en Bordoza aŭ/kaj Sainte-Hélène kaj ankaŭ per reto.

Vi estas bonvenaj por helpi nin! Via ĉeesto povus esti nur rete.



Bon pour 10 leçons d'Espéranto.

L'Espéranto est la langue mondiale, libre, fraternelle, 10X plus facile que l'anglais, etc ...

En DISTENTIEL (vidéo conférence) ou PRÉSENTIEL à Bordeaux et Sainte Héléne.

Debut : juin, le soir, 10 soirées,
Niveau atteint : conversations basiques

Tarif GRATUIT.

Le cours sera un complément à Duolingo (règles de base, prononciation, enrichissements exercices ...)

N'hésitez pas à me contacter pour plus d'informations ou vous inscrire : 06 88 35 09 81

Ne me rétorquez pas : donner quoi à un de tes collègues qui voudrait être tranquille ?

Tiklemaj komentoj de spritema Ĵanseb', kiu antaŭ ol gratuli la partoprenintojn argumentas:

(1) laborigi infanojn (2) je la unua de majo (3) sen pagi ilin (4) antaŭ fikomplezaj senreagaj maldekstruloj! Estas kvarobla skandalo! Kion faras la sindikatoj por ĉesigi tian ekspluatadon?

LA ESKAPANTO

Poemo de Boris Vian

Esperantigita kaj ilustrita de Serge Sire

fulmsobis li la monteton
piedoj ŝtonojn rulegis
ĉe supro mez' de l' kvar muroj
sen ĝoj' kantadis sireno

li spiris arban odoron
plenkorpe kiel forĝilo
la lumo lin akompanis
dancigis ĝi lian ombron

se nur la tempon mi havos
saltante tra la herbejo
li plukis du flav-foliojn
kun suko plena je suno

kanonoj ŝtalaj elspulis
mallongajn flamojn sekpaŝajn
se nur la tempon mi havos
li trafis akvon lirlantan

vizaĝon sian li mergis
pro ĝoj' ridante, li trinkis
se nur la tempon mi havos
ekstaris li por trans-salto

se nur la tempon mi havos
el varma kupro abelo
fulmbatis lin dum la salto
miksiĝis akvo kaj sango

la tempon havis li vidi
la tempon trinki ĉe l' rojo
la tempon porti ĉe l' buŝo
foliojn plenajn je suno

la tempon spiti l' murdistojn
la tempon trafi la bordon
la tempon kuri virinen

la tempon havis li vivi.

<https://www.poetica.fr/poeme-425/boris-vian-evade/>





Memore al Georges Coulonges, fama aŭtoro favora al Esperanto

Ĉu iu el vi, legante libron, iam sentis sin rekte alparolata de la verkisto? Mi volas diri, ĉu vi sentis personan rektan aludon, okulumon de la aŭtoro al vi mem per kelkaj vortoj, eble eĉ nur unu frazo en la teksto?

Tion ni (Klodin' kaj mi) konvinkite spertis, malkovrante "*L'été du grand bonheur*" de Georges Coulonges.

Georges Coulonges estas fama aŭtoro. Li estis iama rezistanto de la FFI, prezidanto de la Popola helposervo¹ de la 17a distrikto en Parizo, kaj membro de MRAP², de la Kontraŭfaŝisma movado, de la Movado por la Paco, kaj de la komunista partio (inter 1964 kaj 1971).

Li verkis teatraĵojn kaj multajn librojn. Al ni plaĉas lia flua stilo kaj la elektitaj popolaj temoj, kiuj montras la profundajn konvinkojn kaj engaĝiĝon de la verkisto. Tial staras en nia biblioteko tuta serio de liaj verkoj. Sed li verkis ankaŭ scenarojn por filmoj kaj televidaj felietonoj, kiel ekzemple *Pause Café* en la 1980-jaroj. Krome li estas poeto kaj verkis tekstojn, kiujn muzikigis pluraj kantistoj. Kaj inter la elstaraj poemoj kuŝas *Potemkine* kaj *La Commune*, famigitaj de Jean Ferrat.

Kiam en la jaro 1996 mi preparis por La Kompanoj spektaklon pri la Pariza Komuno dediĉe al nia karmemora Rolando Levreaud, Gloria donacis al mi libron de Georges Coulonges: *La Commune en chantant*. El ĝi mi ĉerpis multajn ideojn kaj eĉ la titolon **La Komuno, kantante!**. Tial mi skribis al Georges Coulonges petante lian permeson uzi la titolon kaj enŝovi lian kanzonon *La commune* kiel enkondukon al nia teatraĵo. Li entuziasme favore respondis, montrante, ke li tre bone komprenis la signifon de Esperanto kaj eĉ konis la movadon. Sekve sursceneje Joël belege kantis tiun enkondukon.



¹ Secours Populaire

² Mouvement contre le racisme et pour l'amitié entre les peuples

Tri jarojn poste, en oktobro 1999, ni renkontis Georges Coulonges sur aleo de la librofoiro en Bordoza. Tiukaze ni diskutis, kaj plu entuziasme li demandis, ĉu la spektaklo estis sukceso, kaj parolis pri Esperanto kaj ĝia humanisma idealo. Lia subskribo sur la ĵus akirita libro *Le chemin de nos pères*³ atestas pri tio. Vidu la suban bildon. Klodin' eĉ klare memoras ke tiam li aludis, ke eble iam li verkos pri tio.



Kelkajn monatojn poste, en 2000, estis eldonita *L'été du grand bonheur*. Gejunuloj dum somero 1936 kunĝuas la unuajn pagitajn libertempojn en la ĝirondia pinarbaro ie inter Arkaŝono kaj Biskaroso. La aŭtoro naskiĝis en Lacanau, longtempe loĝis en Bordoza, kaj tre bone konis la priskribitajn lokojn.

Meze de la libro (sur la paĝo 167 el 345) legeblas:



"Quelques filles jacassaient encore. Discrètes. Christiane Blondin chuchotait que depuis six mois, son mari et elle apprenaient l'espéranto:

- Un jour, tous les hommes parleront la même langue.

Loulette finit par s'endormir.

Comme une enfant."

Leginte tiun paragrafon, Klodin' kaj mi sentis apartan emocion. Jen rekta aludo al nia interparolado dum la librofoiro. Dankon al Georges Coulonges pro tiu simpla sed signifoplena signo.





Esperantistoj en la vilaĝa biblioteko de Haux

La familio Warnier kutimas viziti la belan bibliotekon de Haux, vilaĝo situanta proksime al Créon. Jen riĉa kaj moderna kulturejo por 850 homa vilaĝo.

Iberla tie aktive partoprenas simpatian ĉiumonatan rendezuon: literatura kafumado. En februaro la diskuto temis pri rusa literaturo. Tial Iberla kaptis la okazon inviti Katja kaj nin partopreni. Kaj ni estis tuj kore bonvenigitaj de Audrey, la juna bibliotekistino, samkiel de cetera ĉeestanta sesopo. Inter ili surprize ĝoje ni retrovis Speranza, la skulptiston, kiu gastigis kunvenon de Esperanto-Gironde en sia artista ĝardeno antaŭ kelkaj jaroj, en ĉeesto de Haŝikuŝi Ŝigejuki, samtempa japana vizitanto. Kaj Speranza mem raportis pri tiu memoriga tago al la ĉeestantoj. Ĉiuj estas librovorantoj! Jen ĵus emeritiĝinta paro de gemuzikistoj, fakinstruistino pri la hispana lingvo, abelisto, fakinstruisto pri franca lingvo.

Dum du horoj ĉiu siavice libere prezentas sian vidpunkton pri tiu aŭtoro, aŭ tiu verko, kaj same libere kaj respektive venas aprobaj komentoj aŭ male kontraŭargumentoj de amiko ĉirkaŭ la tablo.

La etoso de tiu renkonto logis nin al pliaj partoprenoj. Kaj sekve en marto por la poezia kafumado Iberla kun Thibault kunveturigis Katjan tien (dum ni festis la unuan naskiĝtagon de nia lastenaskita nepo). En aprilo la anoncita temo estis: la krimromanoj. Tiam iu demandis: ĉu ekzistas krimromanoj tradukitaj en Esperanto? Vi certe spontane respondus kiel mi, ke ne nur estas tradukitaj sed ankaŭ originale verkitaj kaj mi citis la *Ĉu-serion* de Johan Valano, alinome Claude Piron.

Kaj siavice Iberla kaj Klodin' prezentis la verkon de Gloria: *La conviviale*.

GEME
(Groupe Entre-2-
Mers Esperanto)
praktikas
Esperanton ĉiun
merkredon



GEME por LEGI

Pri *La conviviale*, krimromano de Gloria

La legado estas agrabla kaj interesa. Ĝi promeniĝas la legantojn tra la malnova kvartalo St-Michel de Bordoza kaj borde de Garono. Kondukas nin ankaŭ tra la regiono Inter-du-Maroj (Entre-deux-Mers).

Geamikoj planis amikan renkonton ĉiun duan monaton ĉiufoje en malsama loko.

La titolo spegulas la etoson de tiuj renkontoj. Sed ĉi-foje proksime al Sauveterre-de-Guyenne meze de vitokampoj (videblaj frontpaĝe) okazis dramo.

Sekvis enketo de sendependema policisto Victor Lesage kiel Kolombo, sed estas malfacile prezenti ĝin sen malkaŝi la intrigon. Legu mem!

Post la lasta frazo la rakonto lasas lokon al malferma imago.

Iberla raportas, ke legante la libron ŝi enmense aŭdis la voĉon de Gloria. Marcelo same sentis dum li legis *Monsieur Louis et l'enfant qui ne parlait pas*, alia verko de Gloria.

En 2023 partoprenonte la librosalonon de La Roche-Chalais, Gloria estis invitita konkursi. Ŝi hazarde sendis *La conviviale* sed bedaŭrinde fine ne povis partopreni la salonon pro familiaj aranĝoj. Surprize ŝi ricevis informon de la organizantoj, ke ŝia verko ricevis la premion de la salono. Kelkajn tagojn poste Gloria ricevis el la manoj de la urbestro belan bluan pokalon el grejso, kreita de loka keramisto.

En 2024 Gloria vive partoprenis la salonon de La Roche-Chalais kaj kun multe da plezuro aŭdis la paroladon de la urbestro, kiu ĉarmis la aŭskultantaron per sia humanismo kaj respektemo al kulturo.

Lastlinia averto! Kiuj ŝatas sangelverŝadojn kaj murdojn je ĉiu paĝo riskas seniluziiĝon, ĉar tie nur unu viktimo!

150 paĝoj - formato 148x210



SAT-Eldona Fako Kooperativa

La valizeto 518

Post longa silento, SAT-EFK ĵus eldonis novan libron. Temas pri la unua romano verkita de Marcelo, SAT membro 32847 (li membriĝis 17jara en 1981). Sur la unua interna paĝo legeblas dediĉon : *al la SAT-anaro, kiu kreskigis min.*

Kompreneble, pluraj pluaktivaj membroj de nia loka grupo, rekonu sin samkiel la multaj forpasintaj.



Bazitaj sur historiaj eventoj (la savagado de Aristides de Sousa Mendes en 1940 / la Gŭangĝua Movado por Demokratio en 1980) prezentitaj dum prelegoj okaze de la SAT-kongreso en Porto, fikciaj rolantoj renkontas realajn SAT-anojn. Ja Esperanto gravas kiel ŝlosilo por la heroinoj revivigi siajn familiajn radikojn.

Kion entenas tiu enigma malnova valizeto, kiun Sara, Montreala kuracistino, hazarde malkovris en la ŝranko de sia ĵus mortinta avino? Kiujn familiajn sekretojn ŝi devos alfronti, por sekvi spurojn de Hannah, sia perdita patrino? Ŝin helpos ŝia filino Debora, neatendite per... Esperanto! Verdire: dank' al aktivaj esperantistoj, kaj aparte SAT-anoj (ekz. Eduardo Vivancos en Toronto, la familio Ternant en Parizo, Simonne Bernard kaj ŝiaj posteuloj en Bordoza, Kang Hongu en Seulo), sur tri kontinentoj. Ilia komuna strebo kondukos ilin malkovri Bordozon kaj Porton, dum speciala vojaĝo memore al la homamaso fuĝinta tra Eŭropo sudokcidenten antaŭ la nazia invado en junio 1940. Ili vojaĝos ankaŭ al Seulo kaj ĝis la tombejo *Mangŭoldong* en Gŭangĝuo, kie laŭ diktatoreca ordono specialaj taĉmentoj senindulge masakris studentojn, laboristojn kaj loĝantojn ribelantajn favore al demokratio.

Sara kaj Debora, helpe de novaj geamikoj survoje renkontitaj, provos revivigi la animon de la poetino, kiu postlasis tiun malnovan valizeton. En ĝi, nur kelkaj fotoj kaj tri diverslingvaj notlibroj: la blua verkita en la franca, la ruĝa en la korea, ambaŭ verkitaj en la 1940aj jaroj. La verda en Esperanto finiĝas je la 18a de majo 1980.

El letero de Maria Merla, provlegintino, korektintino:

"Vere min entuziasmigis la verko. (...). La okazaĵoj rakontitaj parte havas historian fonon, disvolviĝas de 1940 ĝis 2016 en Sudfrancio, Portugalio, Koreio kaj Kanado. Rolas interesaj, fortaj virinoj, homoj agante por socia justeco kaj kontraŭ diktaturoj. Kaj jes ja rolas Esperanto en ĉi verko kaj la forte humana kaj internaciisma SAT-ana spirito.

Esperas mi, ke baldaŭ estos eldonita tiu libro. Mi pensas, ke eble en esperanto-kurso (porprogresanta) en Saint Junien ĝi povus esti komune legata."

La legontoj ĝuu fluan lingvon kaj liberan stilon, jen leterforma, jen rakonta, jen poeta.

Romano originale verkita en Esperanto inter septembro 2024 kaj aprilo 2026.

300 paĝoj - formato 148 x 210mm -

mendebila ĉe la libroservo de ESPERANTO-GIRONDE
kontraŭ 9,-€ (plus sendokostoj por 500g = 7,41€)

* * * * *

Poemeto eltirita el la valizeto 518:

**Infano al mi kara, jen la promeso
De via patrin': baldaŭ vivo permesos
Senpere por ni harmonion kaj tiam
Frandeme ja ni ĝuos kune por ĉiam.**

Sed vivo foje tragike forneas plej mildajn patrinajn aspirojn...

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Adreso ĉe la prezidanto

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne
UFR Langues,
Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Vic-Prezidanto: **Seán Ó RIAIN**

98 route du Mouquet
40160 Parentis-en-Born

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**

2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 06 84 11 26 95 / yannickdum@aol.com

* * * * *

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**

☺☺

<https://esperanto-gironde.fr/informletero/>

La venonta kunveno okazos je la 10a30 la 28an de junio en Pessac Bourg.

